# Faru, kion mi ordonas! - ludo

| | |
|---|---|
| **Celo:** | Ekzercado de bazaj lokaj prepozicioj (*sur, en, apud, antaŭ, malantaŭ, inter, super, sub, ĝis, de, al, de sur, el sub*) kun kaj sen akuzativo kaj verboj; atenti la samgrupanojn; kompreni instrukciojn |
| **Celgrupo:** | komencantoj, komencintoj |
| **Antaŭpreparo:** | ne necesas, krom kunpreni tempomezurilon |
| **Tempo:** | 15 minutoj |
| **Ludantoj:** | minimume du grupetoj de 3-5 personoj |

Dum la ekzerco unu lernanto el ĉiu grupo plenumas taskojn, diritajn de la membroj. La instrukcioj devas enhavi prepoziciojn, antaŭe listigitajn de la instruisto.

Post la klarigo ĉiu grupo elektas por si unu „plenumanton”, kiu forlasas la ejon. Post ilia foriro la instruisto skribas sur la tabulon la uzendajn prepoziciojn por la apartaj grupoj (ili povas esti la samaj prepozicioj, sed en malsamaj vicordoj), laŭ kiuj la grupoj pripensas kaj skribas ag-serion, kies priskribo enhavas la necesajn prepoziciojn. Kiam ambaŭ grupetoj pretas, oni venigas la plenumantojn vice kaj diras, kion ŝi/li faru. Necesas mezuri la tempon! Gajnas la grupeto, kie la plenumanto plej rapide solvis ĉiun taskon.

Atentu! Antaŭ ol la „plenumanto” revenas en la ejon, estu forviŝitaj la prepozicioj! Estus bone taksi la grupojn kaj laŭ la rapideco, kaj laŭ la lingva ĝusteco.

**Ekzemplo**:

Uzendaj prepozicioj: *1. sur, 2. apud, 3. malantaŭ, 4. inter, 5. sub, 6. de, 7. al*

Ordonoj: 1. Metu vian libron ***sur*** la tablon de la instruisto! 2. Prenu vian skribilon kaj metu ***apud*** ĝin! 3. Iru ***malantaŭ*** la instruiston! 4. Sidiĝu ***inter*** min kaj Maria! 5. Rigardu ***sub*** la ŝrankon, kio estas tie! 6 – 7. Venu **de** la ŝranko ***al*** via loko kaj restu tie!